<b>Multe da</b>	Mucho de
<b>Ne</b>	No
<b>Nepre</b>	Indefectiblemente, irremisiblemente
<b>Nome</b>	A saber.
<b>Nun</b>	Ahora
<b>Nur</b>	Solamente, meramente
<b>Ofte</b>	Con frecuencia, a menudo
<b>Okaze</b>	Casualmente
<b>Okaze de</b>	En ocasión de
<b>Parkere</b>	De memoria
<b>Pere de</b>	Por medio de
<b>Piede</b>	A pie
<b>Plej</b>	El más, lo más (superlativo)
<b>Pli</b>	Más
<b>Plu</b>	Más (en el tiempo o en el espacio)
<b>Ne plu</b>	No más (en el tiempo o en el espacio)
<b>Poste</b>	Después
<b>Precipe</b>	Principalmente, sobre todo
<b>Prefere</b>	Preferentemente
<b>Preskaŭ</b>	Casi
<b>Propre</b>	Propiamente
<b>Rapide</b>	Rápidamente
<b>Reciproke</b>	Recíprocamente
<b>Ree, denove</b>	Repetidamente, de nuevo
<b>Resume</b>	En resumen, resumidamente
<b>Sekve</b>	Por lo tanto, por consiguiente
<b>Senpere</b>	Directamente, sin intermediario

<b>Sendube</b>	Sin duda	<b>Ankaŭ</b>	También
<b>Speciale</b>	Especialmente	<b>Ankaŭ ne</b>	Tampoco
<b>Spite</b>	A despecho de	<b>Tre</b>	Muy
<b>Subite</b>	Súbitamente, de repente	<b>Tro</b>	Demasiado
<b>Sufiĉe</b>	Suficientemente, bastante	<b>Tuj</b>	En seguida, inmediatamente
<b>Sume</b>	En suma	<b>Tute</b>	Completamente
<b>Supre</b>	Arriba, en lo alto	<b>Tute ne</b>	De ninguna manera
<b>Sube</b>	Abajo	<b>Vane</b>	En vano
<b>Ŝerce</b>	En broma, en chiste	<b>Vere</b>	Verdaderamente
		<b>Vice</b>	En fila, por turno
		<b>Videble</b>	Evidentemente

Véase también en el cuadro de palabras correlativas en la lección 10ª los siguientes adverbios y sus derivados: de cantidad, **Iom**; de lugar, **Ie**; de tiempo, **Iam**; de modo, **Iel**; de causa, **Ial**.

#### E J E M P L O S (sigue)

**Kvazaŭ** - Ŝiaj okuloj kvazaŭ paroladis. La Ŝipo trankvile kvazaŭ fantome glitas sur la ondoj.

**Multe da** - Ĉu vi havas multe da mono? Ne, mi havas tre malmulte (da ĝi).

En la kunveno estis multe da ĉeestantoj (aŭ multaj ĉeestantoj). (En la reunión había muchos asistentes).

**Ne** - Negación. **Nea** (Negativo-a). **Nei** (Negar). **Nee** (Negativamente). **Tio estis ne mia kulpo**. Esti aŭ ne esti, jen la demando.

**Nur** - Mi volas diri al vi nur unu vorton (Deseo decirle a Ud. solamente una palabra). **Nur pri si ŝi prizorgas** (Únicamente de sí misma se ocupa).

**Okaze** - Se okaze mi rekontus lin, mi parolos al li pri tiu afero (Si por casualidad le encontrase le hablaría de ese asunto).

**Okaze de** - Okaze de ŝia naskiĝtago, li donacis al ŝi oran ringon (En ocasión de su cumpleaños, él le regaló [a ella] un anillo de oro).

**Parkere** - Ne estas necese ke vi lernu tion parkere.

**Pere de** - Interparoli pere de interpretisto. Deĉifri egiptan surskribon pere de greka traduko.

**Plej** - Vi povus esti la plej feliĉa el ĉiuj. Ŝi estas la plej bela virino el la urbo. En la plej bona okazo. La Plejpotenca. La Ĉiopova (El Todopoderoso).

**Pli** - Lakto estas pli nutra ol vino. Tiaj personoj ĉiam pretendas esti pli

saĝaj. La fluo fariĝis pli kaj pli forta. Via pano estas malpli freŝa ol mia.

**Plu** - Ŝi volis diri ion plu, sed ŝi ne povis. Se vi legus plu, vi vidus ke la fino estas pli klara. Plu kaj plu faladis la pluvo. Ne parolu plu!

**Supre** - Unuj iris supren kaj aliaj malsupren. Supre de la turo staras nigra flago.

**Tuj** - Faru ĝin tuj. Li tuj faris kion mi ordonis al li. Li foriris tuj post kiam ŝi alvenis. Tuj post tiu domo troviĝas butikoj. La urbo sin trovas tuj sur la bordo de la maro.

**Tute** - Mi estas tute trankvila. Tute libera kiel birdo aera. Por mi estas tute egale.

**Vice** - Vice atendi la aŭtobuson. Laŭvice (por turno). Li, siavice, komprenis ke li estis malprava.

#### E J E R C I C I O S

Atente mi legis vian leteron. Lingvon oni devas lerni unue gramatike kaj poste praktike. Oni devas fari ekzercojn skribe kaj parole, t. e. (tio estas) skribaj ekzercoj kaj parolaj ekzercoj. Apenaŭ li eniris en la ĉambron li petis iun ajn gazeton. Estas bone ke la lernanto legu la ekzercojn almenaŭ dek fojojn (aŭ dekfoje), alie, li ne lernos ilin tute bone. Se vi studas aktive, vi baldaŭ estos la lingvon. Ĉu ankaŭ via frato venos? Mi ne scias, ĉar li ankoraŭ ne diris tion al mi. Ĉu vi memoras ankoraŭ tiujn belajn knabinojn? La infano estis ankoraŭ pli pala, ol hieraŭ. Li diris ankoraŭ kelkajn vortojn. Antaŭ ne longe okazis granda tertremo. Se vi jam faris ĝin, des pli bone, ĉar ju pli frue oni faros ĝin tiom pli bone. Eble venos multaj personoj kaj mi esperas ke eĉ la ministro mem venos. Foje oni diris al mi ke la tero estas kvadrata. Kion vi pensas pri tio? Post multe da diskutado, finfine oni alvenis al konsento. Tiu ĉi mateno mi leviĝis tre frue. En la hispana lingvo estas proverbo kiu diras: "al tiu kiu fruiĝas Dio helpas". Estas multe pli bone alveni ĝustatempe ol tro malfrue. Junuloj! Iru ĉiam antaŭen! Mi dubas ĉu inter ili ekzistas eĉ unu kiu bone scias sian devon. Pri tio mi ne havas eĉ la plej malgrandan dubon. Pli bone ridas tiu kiu ridas la lasta. Kiom da mono vi havas? Mi havas pli-malpli kvin milionojn da pesoj. Pli frue aŭ pli malfrue internacia helpa lingvo estos nepre enkondukita, ĉar ĝi estas nepre bezonata. De nun mi agados malsame ol mi agadis ĝis hodiaŭ. La nunaj ĝeneralaj kondiĉoj de la mondo ne estas tre favoraj. Mi nur volus scii kion ŝi pensas. Antaŭe, li venadis tre ofte, sed nun ni vidas lin nur tre malofte. Aeroplano veturas pli rapide ol vagonaro (aro de vagonoj, trajno). La disvastiĝo de la lingvo Esperanto estas ĉiam pli kaj pli intensa. Post la vespermanĝo ni iris al kinejo, kaj



poste, ni revenis hejmen. Precipe pro tio mi volis paroli al li. Estas pretere ke vi iru por paroli al ŝi. Estas jam preskaŭ la deka horo. Meze de tia bruado oni povis nenion aŭdi. Mi jam klarigis al vi ĉion, sekve, mi havas nenion plu por diri. Subite li interrompis min. Li klarigis al mi tiun aferon, tamen estas io kion mi ne povas kompreni. Kiam mi eksciis la novaĵon, mi tuj prenis la trajnon. Estas tre videble ke la kulpulo ne konfesis ĉion, kion li scias. Ili alvenis tro malfrue. Afable li informis nin pri la okazaĵo. Li konas bone sian metion.

En los casos en que en castellano usamos un adjetivo sin sustantivo que le acompañe, como p. e.: "Sería bueno... Es necesario... Es agradable...". En Esperanto se usa la forma adverbial:

Estas necese ke vi venu (Es necesario que vengas).

Estas agrable aŭdi la kantadon de la birdoj (Es agradable oír el canto de los pájaros).

Ne estas tiel malfacile lerni Esperanton kiam oni ekamas ĝin kaj kiam oni ekkomprenas ĝian spiriton. Ĝi estas vere facilaj kaj simpla, kaj pro tio estas tre facile lerni ĝin. Ĉu ne vere?

Después que haya leído varias veces los ejercicios de la página anterior y los comprenda sin traducir, formule preguntas en base a las frases que se presten a ello, y contéstelas. Ejemplo: **Kiamaniere mi legis vian leteron? Vi legis ĝin atente. Kiel oni devas lerni lingvon?... Kion li faris apenaŭ li eniris en la ĉambron?... Kiom da fojoj estas bone ke la lernanto legu la ekzercojn...**

Haga por lo menos diez preguntas con sus respuestas.

## V O C A B U L A R I O

Naskiĝtago	Cumpleaños	Bruo	Ruido
Donaci	Regalar	Metio	Oficio
Ringo	Anillo	Ŝipo	Barco, nave
Esti prava	Tener razón	Trankvile	Tranquilamente
Leviĝi	Levantarse	Fantome	Como fantasma
Pli-malpli	Más o menos	Glitas	Se desliza
	Tertremo	Temblor de tierra	
	Bru'ad'o	Ruido continuado	
	Esperi	Esperar (en sentido moral)	
	Atendi	Esperar (en sentido material)	
	Konsento	Acuerdo, consentimiento	
	Klarigi	Aclarar, explicar	

## LECCIÓN 20ª

### De la Preposición

Preposición es la palabra que sirve para expresar la relación que existe entre dos palabras: Sombrero **de** paja (**Ĉapelo el pajlo**); Juan entra en su casa (**Johano eniras en sian domon**).

En castellano, como en muchos otros idiomas, las preposiciones tienen el valor que el uso les ha ido dando, y sucede así, que una preposición se usa en diversos sentidos y acepciones, y, a veces, una misma idea se expresa con diferentes preposiciones.

En Esperanto, en cambio, como ya dijimos brevemente en otro lugar, cada preposición tiene su significado propio, fijo y constante. Debemos dedicar, pues, una especial atención al estudio del significado de las preposiciones para usarlas con la debida propiedad.

He aquí las principales preposiciones en E-o:

Al	A, hacia	Krom	Aparte de, además de
Anstataŭ	En lugar de	Kun	Con, en compañía de
Antaŭ	Ante, delante de	Laŭ	Según, de acuerdo a
Apud	Al lado de	Malgraŭ	A pesar de
Cis	De este lado de	Per	Por medio de
Ĉe	En, en casa de	Po	A razón de, a tanto c/u.
Ĉirkaŭ	Alrededor de	Por	Para, por
Da	De (cantidad)	Post	Detrás de, después de
De	De, desde, por	Preter	Más allá
Dum	Mientras,	Pri	Acerca de
Ekster	Fuera de	Pro	A causa de, por (eso)
El	De, de entre	Sen	Sin
En	En, dentro de	Sub	Debajo de
Ĝis	Hasta, espacio y tiempo	Super	Por encima (pendiente)
Inter	Entre	Sur	Sobre (apoyando)
Je	Indefinida	Tra	A través de
Kontraŭ	Contra	Trans	Del otro lado de

La preposición indefinida "je" no tiene significado propio, y se usa en aquellos casos en que el sentido no nos indica con claridad qué preposición hemos de emplear.

He aquí lo que dice el Dr. Zamenhof a este respecto:

"Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je". Sed estas bone uzadi la vorton "je", kiel eble plej malofte. Anstataŭ la vorto "je" ni povas ankaŭ uzi akuzation sen prepozicio. Mi ridas je lia naiveco (Aŭ mi ridas lian naivecon, aŭ mi ridas pro lia naiveco). Je la lasta fojo mi vidis lin ĉe vi (Aŭ la lastan fojon). Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. Mi sopiras je mia perdita feliĉo (Aŭ mian perdintan feliĉon). El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva aŭ ne), ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple: ni povas diri "Obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro". Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri: "pardonu al la malamiko" kaj "pardonu la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardonu al la malamiko lian kulpon". — Z.

#### Ejemplos sobre el uso de las Preposiciones

**Al** - Preposición de Dativo, de dirección, destino, intención, aditamento.

Mi diras tion al vi. Donu tion al via frato. Ŝi iras al la lernejo. La profesoro etendis la manon al la studento. Oni devas deziri bonon al ĉiuj. Li kantis kanzonon al sia amatino. Aliĝi al iu asocio. Aldoni du al kvar. Tio estas konforma al la regulo. Li estis tre afabla al tiu persono.

**Anstataŭ** - Anstataŭ kupro, mi alportos oron. Anstataŭ ŝi, li pagis la ŝuldon. Li serĉas anstataŭanton (Él busca un reemplazante).

**Antaŭ** - Antaŭ la palaco staras statuo. Antaŭ du jaroj mi iris Londonon. Antaŭ du semajnoj, mi vidis la instruiston. Antaŭ ne longe mi parolis al via patro. Mi lasis mian pluvombreton malantaŭ la pordo.

**Apud** - Apud la tablo staras seĝo. Apud la parko staras teatro. Apud mia domo estas butikoj (tienda).

**Cis** - Neologismo de no muy frecuente uso. Su significado es lo contrario de "trans". Trans la rivero (Al otro lado del río); Cis la rivero (De este lado del río). Cisanda regiono (Región de este lado de los Andes; Transanda regiono (Región transandina).

**Ĉe** - Es el "chez" francés. Significa "en", "en casa de", "al pie de": Via frato estis ĉe mi hieraŭ. Antaŭhieraŭ mi estis ĉe mia onklo. Ĉe la alveno de la patro, la infano kontentiĝis. Ĉe tiuj okazoj estas pli bone silenti. Ĉemane (a mano).

**Ĉirkaŭ** - Ĉiuj kokidoj estis ĉirkaŭ la kokino. Li venis min viziti ĉirkaŭ la sepa. Ĉirkaŭpremi (abrazar).

**Da** - Significa "de" en sentido de cantidad, medida, etc., como ya se ha dicho: Unu dekduono da ovoj. Donu al mi glason da akvo. Unu funto da viando. Du metroj da kotona ŝtofo.

**De** - Indica pertenencia (Genitivo): Tiu ombrelo estas de mia fratino; Origen: Oranĝoj de Valencio; punto de partida en el tiempo o en el espacio: De kiam mi vidis vin la lastan fojon, vi multe maldikiĝis. De tie ĉi, ĝis tiu domo. En esta acepción, cuando el caso lo requiera por razones de claridad, puede emplearse las preposiciones compuestas "ekde", "de post", "detempe de", "de antaŭ", "disde": Ekde tiu tago mi ĉiam vizitadis lin. Depost la apero de la homo sur la tero. Detempe de miaj plej junaj jaroj. De antaŭ tri monatoj mi ne vidas lin. Infano apartigita disde sia patrino. Origen de una causa: Tremi de febro. Paliĝi de kolero.

Es también la preposición que se emplea en la Voz Pasiva, y en este caso, es equivalente a "por": Ese cuadro ha sido pintado por el famoso pintor N. Tiu bildo estas pentrita de la fama pentristo N. Si hubiere posibilidad de confusión o de ambigüedad, en lugar de "de", puede emplearse "fare de", o simplemente "far": La detruo de la ponto fare de la malamiko. La nutrado de la infanoj far ilia patrino.

**Dum** - Fleksu arbon dum ĝia juneco. Li estas dumviva membro. Dumnokta spektaklo. Dum la manĝado venas apetito.

**Ekster** - Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. Ekster danĝero. Ekster ia dubo. Eksterordinara.

**El** - Indica salida o extracción, o material de que está hecha una cosa: Eliri el la domo (Salir de la casa). Tiu plumo estas el oro (Esa pluma es de oro). Ne gutas mielo el la ĉielo (No gotea miel de-el cielo). Tio estas traduko el la hispana.

**En** - En la kaŝo estas birdo. Mi eniras en la ĉambron. Mi havas unu kraĵon en mia poŝo. En Buenos Ajres estas multaj hoteloj.

**Ĝis** - Ĝis la fino de la strato. De la komenco ĝis la fino. De antaŭhieraŭ, ĝis postmorgaŭ. Ĝis revido, fartu bone.

**Inter** - Mi ne scias ĉu inter ili estas iu kiu scipovas naĝi. Inter la glavo kaj la muro.

**Kontraŭ** - Li frapis sin kontraŭ la muro. La kuracisto batalis kontraŭ la malsano. Kontraŭveneno.

**Krom** - Aparte de, además de: Krom tio kio estas ĉi tie klarigata, ekzistas aliaj aferoj kiuj estas klarigotaj. Kiel internacia ne povas esti elektita ia alia lingvo krom arta.

**Kun** - Li iris promeni kun sia edzino. Li iris kun gazeto sub la brako. Mi kun mia fratino atendis dum unu horo. (Aŭ unu horon) Li parolis kun saĝo.

**Laŭ** - Laŭ la frukto oni arbon konas. Laŭ mia opinio vi pravas. Laŭ decido de la komitato. Laŭlonge de la rivero. Birdo kantas laŭ sia beko. Laŭvole (a voluntad). Mi konas lin nur laŭ la nomo. Laŭ la ordono de...

**Malgraŭ** - Malgraŭ la malbona vetero ili foriris tutsame.

**Per** - Per kombilo oni kombas sin. Per tranĉilo oni tranĉas. Per segilo oni segas. Mi faris tion per miaj propraj fingroj. Ni vidas per la okuloj. Per kio mi povas esti utila al vi?

En la próxima lección continúan las preposiciones. Construya frases empleando éstas:

### V O C A B U L A R I O

Naiveco	Ingenuidad	Funto	Libra (peso)
Sopiri	Suspirar, añorar	Viando	Carne (para comer)
Postuli	Pedir, exigir	Segi	Aserrar
Naĝi	Nadar	Fare	Adv. de fari
Serĉi	Buscar	Vetero	Tiempo (atmósfera)
Kotona	De algodón	Saĝo	Sabiduría
Ŝtofo	Tela, tejido	Rajto	Derecho
Birdo	Pájaro, ave	Beko	Pico
Pravi	Tener razón	Kaĝo	Jaula

### LECCIÓN 21ª

#### Ejemplos (sigue)

**Po** - Prep. que rige solamente numerales con significado distributivo, repetitivo para cada objeto al que se refiere: Al ĉiu li donis po 4 moneroj (4 monedas a cada uno). Ili trinkis po du boteloj (2 botellas c/u.). Puede usarse como prefijo. Pogrande (Al por mayor), Popece (Por pieza). Pogute (Por gotas). Pometre (Por metro).

**Por** - Tio ĉi estas por mia fianĉino, kaj tio estas por mia fratino. Por tranĉi oni bezonas tranĉilon. Por tiu prezo la vesto ne estas kara. Por nenio oni faras nenion. Por patrino ne ekzistas infano malbela. Por sia oro ĉiu estas sinjoro. Por la unua fojo.

**Post** - Post la pordo (Detrás de la puerta). Post du monatoj (Dentro de dos meses). Iom post iom (poco a poco). Debemos tener presente que cuando es adverbio, debe tomar la forma adverbial. Ya sabemos que adverbio es la palabra que califica a un verbo, y preposición, la que sirve de enlace entre dos palabras. Generalmente después de una preposición va siempre un sustantivo o palabra equivalente: Post la kunveno ni iris en la domon de sinjoro B., kaj poste ni vespermanĝis. Prenu tion, kaj poste, metu ĝin post la pordon.

**Preter** - Preter la Katedralo staras palaco. Li preterpasis la statuon. Li pasis preter mi sen saluto.

**Pri** - Mi jam parolis al la Doktoro pri tiu afero. Ili scias nenion pri tio kion vi diris. Ŝi diris ke ŝi aŭdis nenion pri la novaĵo. Pri gustoj oni disputi ne devas.

**Pro** - La patrino punis la infanon pro lia malbona konduto. Pro tio, mi preferis ne diri ion. Mi venis pro serioza afero.

**Sen** - Sen ia kaŭzo. Senkaŭze. La junulo eliris el la domo sen la patra permeso.

**Sub** - Sub la gvidado de la instruisto. La libro kuŝas sub la tablo, sur la planko.

**Sur** - { La lampo pendas super la tablo, kaj sur la tablo estas diversaj Super - { objektoj.

**Tra** - Tra la mondo iras forta voko. Li rigardis tra la fenestro.

**Trans** - Trans la rivero troviĝas urbeto. Transrivere.

NOTA: Las preps. "al" y "ĝis", tienen significado de dirección, y por lo tanto, cuando se emplean estas preposiciones, no emplearemos el acusativo de dirección.

OTRA: Las únicas preps. que pueden preceder a los verbos en infinitivo, son las siguientes:

Anstataŭ, antaŭ (que entonces toma la conjunción "ol"), por y sen.

Anstataŭ labori, li ludas.

Anstataŭ veni, li skribis.

Antaŭ ol paroli, oni devas pripensi.

Antaŭ ol foriri, li rekomendis tion al mi.

Por montri ke li estas prava, li faris tion.

Li restis du tagojn sen manĝi.

Cuando a la prep. "por" le sigue la conjunción "ke", se debe poner el verbo que sigue en Imperativo-Subjuntivo: **Mi donas tion al vi por ke vi donu ĝin al via fratino.** Por ke vi ne forgesu tion, mi rediras ĝin al vi.

La mayoría de las preposiciones son susceptibles de usarse como prefijos, y también de tomar otras terminaciones gramaticales o afijos. A continuación damos algunos ejemplos.

Aliri	Ir, ir hacia	Interŝanĝo	Intercambio
Aldoni	Sumar, agregar	Kontraŭstari	Oponerse
Anstataŭi	Sustituir	Kromfolio	Hoja extra
Antaŭa	Anterior	Laŭdire	Según se dice
Antaŭe	Anteriormente	Laŭvice	Por turno
Antaŭdiri	Predecir	Laŭvorte	Literalmente
Antaŭsenti	Presentir	Peranto	Intermediario
Antaŭjuĝi	Prejuzgar	Porpaca	Pro paz
Ĉeesti	Estar en,	Postmilito	Postguerra
Ĉirkaŭpremi	Abrazar	Pretero (la)	Más allá (el)
Ĉirkaŭi	Rodear	Prizorgi	Cuidar de
Ĉirkaŭfrazo	Perífrasis	Senmovi	Inmóvil
Demeti	Quitar-se	Senutila	Inútil (adj.).
Deveno	Origen	Sendependi	Independiente
Eliri	Salir	Sendube	Indudablemente
Eniri	Entrar	Senfina	Sin fin (adj.)
Eldoni	Editar, emitir	Senkapigi	Decapitar
Eksterlande	En el exterior	Sentaŭgulo	Inservible
Eksterurbe	Fuera de la ciudad	Subpremi	Oprimir
Elmontri	Mostrar	Subulo	Súbdito
Elŝipiĝi	Desembarcar-se	Superulo	Superior (un)
Enŝipiĝi	Embarcar-se	Surgenui	Arrodillarse
Enhavi	Contener	Surmeti	Poner sobre
Formanĝi	Comer-se	Trastudi	Estudiar, compl'te
Ĝisnune	Hasta ahora	Transloĝiĝi	Mudarse de casa

k.t.p., k.t.p.

Algunas veces por razones de claridad y precisión será conveniente emplear preps. compuestas como las ya indicadas al tratar de la prep. "de", u otras como, "elde", "de el", "de inter", "el inter", "de sub", "ĝis antaŭ", o un adverbio y una preposición como, "fare de", "Age de", "de tempe de", "honore al", "responde al", "escepte de", "kompare kun", etc., etc.

**Dank' al** - Contracción preposicional (Danke al...) Gracias a... **Dank' al la ĝentileco de tiu sinjoro, ni povis trovi nian vojon.**

### MÁS SUFIJOS

El Sufijo "ej" indica lugar adecuado o destinado para hacer lo que indica la raíz:

Preĝi	Rezar	Preĝejo	Iglesia
Lerni	Aprender	Lernejo	Escuela
Libro	Libro	Librejo	Librería
Malsanulo	Enfermo	Malsanulejo	Hospital

El Sufijo "ist" indica oficio, profesión u ocupación habitual:

Kuiri	Cocinar	Kuiristo	Cocinero
Kaso	Caja	Kasisto	Cajero
Piano	Piano	Pianisto	Pianista
Pordo	Puerta	Pordisto	Portero

El Sufijo "ism" indica idea, tendencia o profesión de fe, etc.:

Kristano	Cristiano	Kristanismo	Cristianismo
Asketo	Asceta	Asketismo	Ascetismo
Esperanto	Esperanto	Esperantismo	Esperantismo

Se usa también el prefijo internacional "anti", con el significado que todos conocemos, esto es, de "contrario", "opuesto", "hostil":

**Antikorpusklo - Antitoksino - Antitezo -**

**Antikorpo - Antibiotiko - Antikristo - etc.**

### EJERCICIOS

Post harda kaj longa laboro, oni bezonas ripozon. Unue oni laboras, kaj poste oni ripozas. Post du semajnoj alvenos en Buenos Ajres'n la fama filmaktoro N., kaj post monata restado inter ni, li vojaĝos al Montevideo. Anstataŭ fari tion li mem, li devigis sian malgrandan fraton ĝin fari. Dank' al la grandaj kaj luksaj vaporŝipoj kaj aerŝipoj kiuj rapidveturas

ĉiudirekten, nuntempe estas tre facile ĉirkaŭvojaĝi la tutan mondon dum tre mallonga tempo. Ĉu vi ŝatus ĉirkaŭvojaĝi la tutan mondon? . . . Ankaŭ mi. En la malnovaj tempoj, la pasaĝeroj veturis per tiu, jam malaperinta veturilo, la diligenco. Hodiaŭ (nuntempe), oni veturas multe pli rapide, ekz. per aŭtobuso, trajno, vaporŝipo, aeroplano kaj aliaj tre rapidaj veturiloj. Li amas tiun ĉi fraŭlinon pro ŝia beleco. Okulo pro okulo, dento pro dento. Por ŝafon formangĝi lupon trovos pretekston. Ĉe malfacilaj cirkonstancoj oni bezonas grandan kuraĝon. Laŭ sciigoj aperintaj en la gazetoj, la venontan jaron la mondfamkonata verkisto N. N. vojaĝos al Afriko por fari esplorojn pri la vivo de l' simioj. Malgraŭ miaj konsiloj li faris tion. Per grandaj penoj li sukcesis. Li laboregis per siaj tutaj fortoj. Dum malvarma vetero estas necese vesti sin per dikaj vestaĵoj, sed, kontraŭe, dum varma vetero ni vestas nin per maldikaj, malpezaj vestaĵoj. Jen estas la ĉefaj vestaĵoj de viro: Jako, veŝto, pantalono, ĉemizo, kamizolo, kalsono, kolumo, kravato, ĉapelo, ŝuoj, ŝtrumpoj, surtuto.

#### TRABAJO PARA REMITIR POR CORREO:

Construya seis u ocho frases empleando lo más posible las preposiciones.

Traduzca lo siguiente: Más allá de la arboleda hay un río, al otro lado del río hay un palacio, y ante el palacio se eleva (staras) un monumento.

¿Acerca de qué quería Ud. hablarme?

Complete las palabras: Post ki. . . mi est. . . alven. . . . de mi. vojaĝo tra la tut. mond., mi tuj ir. . . vizit. mi. . . am. . . . . patr. . . (vea lec. 8ª prefijo "ge").

#### V O C A B U L A R I O

<b>Gvidado</b>	Guía	<b>Peno</b>	Esfuerzo
<b>Voko</b>	Llamado	<b>Sukcesi</b>	Tener éxito
<b>Harda</b>	Arduo	<b>Ripozi</b>	Descansar
<b>Vaporŝipo</b>	Buque a vapor	<b>Simio</b>	Mono
<b>Jako</b>	Saco	<b>Kolumo</b>	Cuello postizo
<b>Veŝto</b>	Chaleco	<b>Ŝtrumpoj</b>	Medias
<b>Subĉemizo</b>	Camiseta	<b>Ĉemizo</b>	Camisa
<b>Ĉapelo</b>	Sombrero	<b>Kalsono</b>	Calzoncillos
<b>Ŝuoj</b>	Zapatos	<b>Surtuto</b>	Sobretodo
<b>Ŝafo</b>	Cordero	<b>Lupo</b>	Lobo

## LECCIÓN 22ª

### SUFIJOS

El sufijo "uj" indica recipiente, vasija, caja, continente de algo:

<b>Inko</b>	Tinta	<b>Inkujo</b>	Tintero
<b>Supo</b>	Sopa	<b>Supujo</b>	Sopera
<b>Sukero</b>	Azúcar	<b>Sukerujo</b>	Azucarera
<b>Pano</b>	Pan	<b>Panujo</b>	Panera

Úsase también este sufijo en la designación de los árboles frutales agregado a la raíz que expresa el nombre de la fruta. Se usa también para el mismo propósito, la raíz, "arb" (árbol) empleada como sufijo:

<b>Piro</b>	Pera	<b>Pirujo aŭ pirarbo</b>	Peral
<b>Ĉerizo</b>	Cereza	<b>Ĉerizujo aŭ ĉerizarbo</b>	Cerezo
<b>Olivo</b>	Oliva	<b>Olivujo aŭ olivarbo</b>	Olivo

Se emplea asimismo el sufijo "uj" en la formación del nombre de aquellas naciones que toman su nombre del de sus habitantes:

<b>Hispano</b>	Español	<b>Hispanujo</b>	España
<b>Franco</b>	Francés	<b>Francujo</b>	Francia
<b>Germano</b>	Alemán	<b>Germanujo</b>	Alemania
<b>Italo</b>	Italiano	<b>Italujo</b>	Italia

Se usa también indistintamente la terminación "io": **Hispanio, Italio, Francio, Germanio**, etc.

Los nombres de los países de América, como por lo general en ellos predomina el nombre de la nación sobre el de sus primitivos habitantes, no toman el sufijo "uj", y el nombre de sus habitantes se forma con ayuda del sufijo "an":

<b>Argentino</b>	Argentina	<b>Argentinano</b>	Argentino
<b>Brazilo</b>	Brasil	<b>Brazilano</b>	Brasileño
<b>Ĉilio</b>	Chile	<b>Ĉiliano</b>	Chileno
<b>Urugvajo</b>	Uruguay	<b>Urugvajano</b>	Uruguayo
<b>Kanado</b>	Canadá	<b>Kanadano</b>	Canadiense

El sufijo "ing" significa el objeto en que se introduce otro objeto, como, vaina, candelero, etc.

<b>Glavo</b>	Espada	<b>Glavingo</b>	Vaina de espada
<b>Kandelo</b>	Vela	<b>Kandelingo</b>	Candelero
<b>Fingro</b>	Dedo	<b>Fingringo</b>	Dedal

El sufijo "em" indica inclinación, tendencia o hábito a hacer una cosa:

<b>Babili</b>	Charlar	<b>Babilema</b>	Amigo de charlar
<b>Labori</b>	Trabajar	<b>Laborema</b>	Trabajador (adj.)
<b>Mensogi</b>	Mentir	<b>Mensogema</b>	Mentiroso

El sufijo "end" indica algo que debe ser irremisiblemente hecho:

<b>Farenda laboro</b>	Labor que tiene que hacerse
<b>Pagenda sumo</b>	Suma que tiene que pagarse
<b>Direnda vorto</b>	Palabra que tiene que decirse

El sufijo "ind" indica la cosa que merece, o es digna de:

<b>Laŭdi</b>	Alabar	<b>Laŭdinda</b>	Digno de alabanza
<b>Ridi</b>	Reír	<b>Ridinda</b>	Ridículo
<b>Pardoni</b>	Perdonar	<b>Pardoninda</b>	Digno de perdón

El prefijo "eks" indica cese en alguna profesión, función u oficio:

<b>Eksfabrikanto</b>	Ex fabrikante
<b>Eksoficiro</b>	Ex oficial
<b>Eksfunciulo</b>	Ex funcionario

**Eksigi:** Despedir a alguien de su pueste

**Eksigi:** Dejar de desempeñar un cargo

El sufijo "aê" indica deterioro, inferioridad, desprecio:

<b>Ĉevalo</b>	Caballo	<b>Ĉevalaêo</b>	Matungo
<b>Domo</b>	Casa	<b>Domaêo</b>	Casucha
<b>Strato</b>	Calle	<b>Strataêo</b>	Callejuela

Los sufijos "êj" y "nj" colocados después de la 2ª, 3ª, 4ª o 5ª letra de un nombre propio (el primero para los masculinos y el segundo para los femeninos), dan a éste, significado diminutivo cariñoso:

<b>Paêjo</b>	Papito
<b>Panjo</b>	Mamita
<b>Josefêjo</b>	Josesito
<b>Marinjo</b>	Marieta, Mariquita
	<b>K.t.p.</b>

Y, por último, existe también el sufijo indeterminado que juega un papel entre los sufijos, semejante al que juega la preposición "je" entre las preposiciones. Este sufijo es "um", y se emplea para indicar algo que de alguna manera tiene alguna relación con lo que expresa la raíz:

<b>Kolo</b>	Cuello	<b>Kolumo</b>	Cuello postizo
<b>Mano</b>	Mano	<b>Manumo</b>	Puño postizo
<b>Kruco</b>	Cruz	<b>Krucumi</b>	Crucificar
<b>Pleni</b>	Llenar	<b>Plenumi</b>	Cumplir
<b>Vento</b>	Viento	<b>Ventumi sin</b>	Abanicarse
<b>Suno</b>	Sol	<b>Sunumi sin</b>	Tomar sol
<b>Ami</b>	Amar	<b>Amindumi</b>	Galantear
<b>Malvarmo</b>	Frío	<b>Malvarmumo</b>	Resfrío

## EJERCICIOS

La patro eltiris la monujon el sia poŝo, kaj donis al la infano du nikelajn monerojn. Johano eltiris sian cigarujon kaj el ĝi li elprenis unu cigaredon kiun li metis en sian cigaringon, kaj fine, li, per alumeto, ekbruligis la cigaredon kaj ekfumis. Tiu instruisto estis tre punema kaj ankaŭ venĝema. Se li ne estus tiel babilema, li estus pli fidinda. Tiu fraŭlino estas vere aminda, ŝi havas tre ŝatindan karakteron. Ne ĉio kio estas legebla estas leginda ĉar ekzistas multaj libraĉoj kiuj ja ne estas indaj je legado. Figujo, aŭ figarbo, estas la arbo kies frukto estas la figoj. Mia avo havas grandan pomarbaron, ĝi konsistas el pli ol ducent pomujoj. En anglujo oni parolas angle, kaj en germanujo, oni parolas germane. En Argentino oni parolas la hispanan lingvon: oni parolas hispane. Estas multaj gravaj literaturaj verkoj tradukitaj Esperanten. Kaj ankaŭ ekzistas multaj verkoj kiuj estis verkitaĵe rekte en Esperanto, kaj poste ili estis tradukitaj en aliajn naciajn lingvojn.

La brava soldato kun aroganta mieno eltiris sian glavon el ĝia ingo kaj per ĝi. . . . li akiris sian krajonon. La laboremulo ĉiam sentos sin pli feliĉa ol la mallaboremulo; sed malgraŭ tio, kiom da mallaboremuloj sin trovas en la mondo! Oni kondukis la mortigistojn en la malliberejon. La elspezemo de lia edzino frenezis lin. La infano kriegis, sed mi donis al li moneron, kaj tio kontentigis lin. Oni esperas ke ĉiu plenumu sian devon. Li tute akurate plenumis la ordonon de la ĉefo. La Egiptaj piramidoj estas unu el la mondaj mirindaĵoj. Tiu poemo estas vere admirinda.

Pagenda sumo estas tia sumo kia nepre devas esti pagata, kaj pagota sumo, estas sumo kiu devas esti pagata en la estonto, sed kiu povas esti pagata aŭ ne; dum pagenda sumo estas sumo kiu nepre devas esti pagata. Tiu ĉi problemo estas solvenda antaŭ ol ni disigu. Dum nia lasta vojaĝo tra la kamparo kelkfoje ni estis devigataj veturi sur malnovaj veturilaĉoj tirataj de maljunaj kompatindaj ĉevalaĉoj. Panjo, ĉu paĉjo jam alvenis?

esperplene demandis la knabeto. Ĉu vi estas varma? Kial vi ne ekfunkciigas la elektran ventofanilon? Mi provis ĝin ekfunkciigi, sed ĝi ne funkcias. Ni disigis kaj iris en diversajn flankojn; mi iris dekstren, kaj ili iris maldekstren. Flanken, sinjoroj! Via ago estas tre laŭdinda. Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda. En varmega tago, mi amas promeni en arbaro. Buenos Ajres estas la ĉefurbo de Argentino.

Vea la nota al final de la lección 19ª, y proceda con los ejercicios que anteceden en la misma forma.

Será una práctica muy provechosa escribir diálogos, pequeñas composiciones y cartas con ayuda de los vocabularios que figuran en el Apéndice.

Procúrese que el contexto sea claro, evitando traducir literalmente algunos modismos de carácter demasiado localista que pueden resultar poco claros en el orden internacional. Por otro lado, creemos oportuno citar aquí la siguiente manifestación del doctor Zamenhof:

“Ĉiun bonan esprimon kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si” - Z.

### V O C A B U L A R I O

Nepre	Indefectiblemente
Bruli	Arder
Bruligi	Quemar
Ekbruligi	Encender
Fumi	Fumar
Venĝi	Vengar
Ŝati	Apreciar
Fido	Fe
Figo	Higo
Grava	Importante
Mieno	Talante, apostura
Akrigi	Afilar
Akra	Agudo, afilado
Elspezi	Gastar
Enspezi	Cobrar
Freneza	Loco (adj.)
Flanko	Lado, costado
Laŭdi	Alabar
Rajto	Derecho

KIEL INTERNACIA NENIAM ESTOS ELEKTITA IA ALIA LINGVO  
KROM ARTA. ESPERANTO ESTAS LA PLEJPERFEKTA ARTA LINGVO.

## LECCIÓN 23ª

### LA CONJUNCIÓN

Es la parte de la oración que sirve para enlazar las palabras y las oraciones unas con otras: El hogar y la escuela (La hejmo kaj la lernejo). Iré si puedo (Mi iros se mi povos).

Las conjunciones más frecuentes en Esperanto son las siguientes:

Anstataŭ	En lugar de
Aŭ	O
Ĉar	Porque, puesto que
Ĉu	Partic. interrogativa
De kiam	Desde que
Do	Pues, por lo tanto
Dum	Mientras (que)
Kaj	Y
Ke	Que
Kondiĉe ke	Con tal que, siempre que
Kvankam	Aunque
Kvazaŭ	Como si (fuera)
Laŭ tio se	Según que
Nek	Ni
Nu	Ahora bien, pues bien
Ol	Que (en comparaciones)
Plus	Más
Por ke	Para que
Post kiam	Después que
Pretekste ke	Con el pretexto de que
Pro tio, ke	Por tal causa o motivo
Se	Si (condicional)
Sed	Pero
Tamen	Sin embargo
Tial ke	Porque, ya que
Timante ke	Temiendo que
Tuj kiam	En seguida que

### EJEMPLOS SOBRE EL USO DE LAS CONJUNCCIONES

Anstataŭ - Anstataŭ babili, laboru. Petro batis Paŭlon anstataŭ (bati) Jozefon.

Ĉar - Kial vi ne venis? Mi ne venis ĉar mi estis tre okupita. Kial vi ne manĝas? Ĉar mi ne estas malsata (porque no tengo hambre).

**Ĉu** - Ĉu via frato venos? Mi ne scias ĉu li venos aŭ ne; sed mi multe dubas ĉu li venos. Li demandis min, ĉu li povos veni. Mi ne scias, ĉu tio estas vera.

**Do** - Mi jam diris tion al vi pli ol unu fojon, do, vi ne povas senkulpigi vin. Tion dirinte, do, li daŭrigis sian rakonton.

**Dum** - Forĝu ferojn dum ĝi estas varmega. Li estas nur infano dum vi estas jam plenkreskulo.

**Ke** - La kuracisto certigis ke la malsanulo resaniĝos. Oni esperas ke ĉiu plenumos sian devon. Ŝi diris al mi ke ŝi bezonas monon. La patro donis monon al la filo por ke li aĉetu libron.

**Kondiĉe ke** - Mi donos ĝin al vi kondiĉe ke vi redonos ĝin al mi morgaŭ matene.

**Kvankam** - Kvankam la vetero ne ŝajnis tre favora, ili eliris tutsame.

**Kvazaŭ** - Tiu fraŭlino parolas kvazaŭ ŝi estus princino. Li aspektis kvazaŭ ia terura malfeliĉo estus okazinta. La ĉielo malheliĝis kvazaŭ nokto.

**Laŭ tio se** - Ĉu vi venos kun ni la venontan Dimanĉon? Tio estos laŭ tio, se mi havos monon.

**Nek** - Nek vi nek tutaj viaj riĉaĵoj ŝanĝigos mian decidon. Li estas nek kapabla, nek inteligenta. Mi vidis nek lin nek lian fraton. Restas nek konsilo nek konsolo.

**Nu** - Nu, mia kara, kion vi respondas al tio? Nu, ni ekmarŝu. Nu, ĉu vi estas preta?

**Ol** - Pli bona pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero. Taksi iun pli alte ol kiom li meritas. Antaŭ ol forveturi, li manĝis.

**Post kiam** - Post kiam vi foriris, ili alvenis. Post kiam vi finos vian laboron, bonvolu voki min.

**Pretekste ke** - Li eniris en la domon pretekste ke tie loĝas unu lia konatulo.

**Pro tio, ke** - Vi ne devas kulpigi min pro tio, ke mi ne plenumis vian deziron.

**Se** - Se ĉiu homo plenumus sian devon, la mondaj kondiĉoj estus tute aliaj. Diru al mi se ŝi intencas veni. Jes, amiko, mi dirus tion al vi tre volonte, se mi mem tion sciis, sed mi ne scias ĉu ŝi venos aŭ ne. Se vi vidas lin, salutu lin je mia nomo.

**Sed** - Mia intenco estis vin viziti antaŭhieraŭ, sed lastmomente mi renkontis nerifuzeblan kompromison. Marinjo kantas tre bone, sed ŝia fratino kantas ankoraŭ multe pli bone.

**Tamen** - La Maljunulo tamen daŭrigis sian vojon. Li estis riĉa, tamen li estis sufiĉe malsaga.

**Tial, ke** - Ĉiuj ŝatis Esperanton nur tial, ke ĝi alprosimigas reciproke la korojn de la homoj.

## EJERCICIOS

Ĉu frue aŭ malfrue, tio ne gravas, la afero estas ke vi ĝin faru. Ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis. Ĉar la aktorino ne estis longe aplaŭdata, ŝi malsaniĝis. Mi volegis ŝin paroli, sed ĉiufoje kiam mi estis ŝin parolonta, iu aŭ alia alvokis ŝin. Ĉu kaŭze de unu afero, ĉu kaŭze de alia, mi neniam povis lin renkonti. De kiam vi publikigis vian lastan verkon, mi volis vin renkonti por vin gratuli, sed, tamen, tio ne estis ebla al mi ĝis ĉi tiu momento. Junulo, mi estas pli aĝa kaj havas multe pli da sperto ol vi, aŭskultu min do. Kial do, ni estos ĝenataj de tiuj bagateloj? Energie diris la direktoro. Oni disdonis diversajn premiojn, kiel librojn, Albumojn, artajn fotografaĵojn k.t.p. (aŭ k.s. - kaj simile). Inter la ĉeestantoj oni rimarkis la jenajn personojn: La Baronan moŝton P., lian edzinon kaj filinon, gesinjorojn N. kaj M., fraŭlinojn T., S. kaj P. kaj aliajn. Kvankam li estis trompinta ŝin plurajn fojojn, tamen, ŝi ankoraŭ amis lin. La ĉielo estis kovrita de nuboj, kaj estis malhele kvazaŭ nokto. Ĉu vi aĉetos la gitaron, aŭ la violonon? Laŭ tio se mia patro donas al mi sufiĉan monon, mi eble aĉetos ambaŭ, la gitaron kaj la violonon, sed se li donas al mi neniom tiam mi aĉetos nek la gitaron nek la violonon. Se eĉ nur malmulte da mono ŝi havus, ŝi estus tute kontenta. Kial vi faras tion? Mi faras ĝin tial ke mi estas devigata ĝin fari (aŭ ĉar mi estas devigata ĝin fari). Kial vi agis tiel stulte? Mi agis tiel, tial ke mi ne sciis agi pli saĝe (aŭ ĉar mi ne sciis). Pro kio vi plendas? Mi plendas pro tio ke tiu homaĉo nomis min stultulo. Ho! kia senhontulo (*sin vergüenza*) li parolas kvazaŭ li konus vin de longa tempo. Timante ke li estus punita se li ne alvenas domen ĝustatempe, la knabo rapidis hejmen tuj kiam li estis elirinta el la lernejo. Kia domaĝo ke vi ne venis kun ni hieraŭ nokte, ni amuzis nin tiom multe! Kvar plus kvin estas naŭ. Ho! vi jam alvenis, mi pensis ke vi alvenus multe pli malfrue. Ho ve! kion vi faris, infano. Nu, ĉu ĉio estas preta? Jes. Ni ekmarŝu do. Nu, kion vi pensas pri tio? Hieraŭ matene la ĉielo estis tute sennuba, tamen posttagmeze pluvegis torente. Unuavide l' afero ŝajnis tute en ordo, sed tamen kiam oni ekzamenis ĝin pli atente, aperis iaj malregulaĵoj.

## INTERJECCIÓN

Es la palabra con que expresamos los varios estados del ánimo. En Esperanto, como en otros idiomas, hay muchas palabras que se usan como interjecciones, aunque no sean propiamente tales, como p. ej.: **Zorgon!** (¡Cuidado!). **Silenton!** (¡Silencio!), etc.



He aquí algunas interjecciones:

<b>Ha!</b>	¡Ah!	<b>Help!</b>	¡Auxilio!
<b>He!</b>	¡Eh!	<b>Hura!</b>	¡Hurra!
<b>Ho!</b>	¡Oh!	<b>Ve!</b>	De queja, amenaza, etc.
<b>For!</b>	¡Fuera!	<b>Nu!</b>	Y, bien
<b>Halt!</b>	¡Alto!	<b>Bis!</b>	¡Bis!
<b>Hola!</b>	¡Hola!	<b>Fi!</b>	¡Uf!

Ha! bone, mi tuj iros.

He! kion vi portas en la sako?

For de tie ĉi! Vi, senhontuloj!

Hola!, amiko, kia plezuro vin renkonti.

Hura! nia teamo venkis.

Ve! al la venkitoj!

Nu!, ĉu vi estas preta?

La interjección "fi" empleada como prefijo, da a las palabras a las que se junta significación de bajeza, degradación o repulsión: **Fihomo** (un ruin). **Fiinsekto** (un insecto repulsivo).

.....

Escriba una composición sobre cualquier tema, de una carilla más o menos, y reténgala para enviárnosla juntamente con lo que indicaremos en la próxima lección.

### V O C A B U L A R I O

<b>Timo</b>	Temor	<b>Fiereco</b>	.Orgullo
<b>Daŭrigi</b>	Continuar	<b>Gratuli</b>	Felicitar
<b>Kuraci</b>	Curar	<b>Aĝo</b>	Edad
<b>Kuracisto</b>	Médico	<b>Aŭskulti</b>	Escuchar
<b>Plenumi</b>	Cumplir	<b>Ĝeni</b>	Molestar
<b>Malheliĝi</b>	Obscurecerse	<b>Trompi</b>	Engañar
<b>Ŝanĝi</b>	Cambiar	<b>Pluraĵ</b>	Varios-as
<b>Voki</b>	Lllamar	<b>Plendi</b>	Quejarse
<b>Kauze de</b>	A causa de	<b>Amuzi sin</b>	Divertirse
<b>Vojo</b>	Camino, vía	<b>Puni</b>	Castigar
<b>Miri</b>	Admirarse, sorprenderse		
<b>Certigi</b>	Asegurar, afirmar		
<b>Volonte</b>	De buen grado, con mucho gusto		

## LECCIÓN 24ª

### DE LAS PALABRAS

Existen en Esperanto palabras simples, derivadas y compuestas.

Son palabras simples aquellas que tienen significado en sí mismas sin tomar ninguna terminación gramatical, como las palabras del cuadro dado en la lección 10ª, y otras, como: **Hodiaŭ**, **ankoraŭ**, **pli**, **post**, **tuj**. **k.t.p.**, **k.t.p.**

Son palabras derivadas las formadas con ayuda de los afijos, como: **Malfeliĉa**, **rekomenci**, **facileco**, **infano**, **k.t.p.**, **k.t.p.**

Y son palabras compuestas las formadas mediante la reunión de dos o más raíces con, o sin afijos.

Al formar palabras compuestas debemos tener en cuenta que la palabra principal va al final, y la palabra que califica va delante:

<b>Poŝtkarto</b>	(karto de poŝto)	Tarjeta postal
<b>Vizitkarto</b>	(karto de vizito)	Tarjeta de visita
<b>Ĉefurbo</b>	(Urbo ĉefa)	Capital (ciudad)

Como se ve, para formar palabras compuestas, simplemente se toma la primera raíz, o sea la que califica o aclara, a la que se agrega la raíz principal, la cual toma la terminación gramatical que corresponda, según su significado:

<b>Belsona</b>	Que tiene sonido agradable
<b>Preĝlibro</b>	Libro de oraciones
<b>Ĉirkaŭpremi</b>	Abrazar

Si sucediera que la palabra compuesta así obtenida, no resultase de fácil pronunciación, se agregará a la primera raíz la terminación sustantiva, o, la que según el significado, mejor convenga:

<b>Skribotablo</b>	mejor que <b>Skribtablo</b>	— Mesa-escritorio
<b>Mangosalono</b>	„ „	<b>Mangŝalono</b> — Salón comedor
<b>Baptopatrino</b>	„ „	<b>Baptpatrino</b> — Madrina de bautizo

A veces puede ser imprescindible el agregar a la primera raíz la terminación gramatical para mejor definir el significado de la palabra compuesta:

<b>Unujara</b>	Que dura un año
<b>Unuajara</b>	Del primer año
<b>Unuklasa</b>	De una clase
<b>Unuaklasa</b>	De primera clase

Con el fin de que el alumno se familiarice con las características, y con el arte de formar palabras compuestas, damos a continuación algunos ejemplos:

<b>Samlingvano</b>	Que habla el mismo idioma
<b>Partopreni</b>	Tomar parte en
<b>Doganimpostoj</b>	Impuestos de Aduana
<b>Kulturlingvo</b>	Idioma de cultura
<b>Tutmonda</b>	De todo el mundo
<b>Tagĵurnalo</b>	Periódico diario
<b>Eldonjaro</b>	Año de edición
<b>Egalvaloro</b>	Valor equivalente
<b>Poŝtmarko</b>	Estampilla de correo
<b>Eksterlande</b>	En el extranjero
<b>Dumviva</b>	Vitalicio
<b>Abonkotizo</b>	Cuota de abono
<b>Homamaso</b>	Multitud, muchedumbre (personas)
<b>Rozkolora</b>	De color de rosa
<b>Liberpensulo</b>	Librepensador
<b>Ĉirkaŭpremi</b>	Abrazar
<b>Postagmezo</b>	Después de mediodía (tarde)
<b>Tiamaniere</b>	De esa manera (adv.)
<b>Plimulto, la</b>	La mayoría
<b>Aliparte</b>	Por otra parte
<b>Fajroadorantoj</b>	Adoradores del fuego
<b>Kvinjarplano</b>	Plan de cinco años
<b>Fervojo</b>	Ferrocarril
<b>Unuaranga</b>	De primer rango
<b>Ĝustatempe</b>	Justo a tiempo
<b>Preterpasi</b>	Pasar de largo
<b>Unutaga</b>	Que dura un día
<b>Teatramanto</b>	Amante del teatro
<b>Korktirilo</b>	Sacacorchos
<b>Duonpatrino</b>	Madrastra
<b>Kvarpieda</b>	Cuadrúpedo
<b>Antaŭmilite</b>	Antes de la guerra
<b>Postmilita</b>	De la postguerra
<b>Scivolemo</b>	Curiosidad
<b>Pluvombrelo</b>	Paraguas
<b>Sunombrelo</b>	Sombrilla

<b>Okulvitroj</b>	Anteojos
<b>Ventmueliloj</b>	Molinos de viento
<b>Matenmanĝo</b>	Almuerzo
<b>Tagmanĝo</b>	Comida (del mediodía)
<b>Vespermanĝo</b>	Cena
<b>Dusenca</b>	De sentido ambiguo
<b>Dekkapa</b>	De diez cabezas
<b>Interŝanĝi</b>	Intercambiar
<b>Tranokti</b>	Pernoctar
<b>Travintri</b>	Invernar
<b>Antaŭhieraŭ</b>	Anteayer
<b>Antaŭjuĝi</b>	Prejuzar
<b>Antaŭŝenti</b>	Presentir
<b>Pligrandigi</b>	Agrandar
<b>Malgrandfidulo</b>	Hombre de poca fe
<b>Memfidema</b>	Que se tiene fe
<b>Memamo</b>	Amor propio
<b>Memdefendo</b>	Defensa propia
<b>Memevidenta</b>	Evidente de por sí
<b>K.t.p.</b>	Etc.

“Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed se la bonsonco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. Skribtablo aŭ skribotablo (tablo sur kiu oni skribas); Internacia (kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (de la tuta mondo); unutaga (kiu daŭras unu tago); unuataga (kiu estas en la unua tago); vaporŝipo (ŝipo kiu sin movas per vaporo); matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (pago por la abono)”. — (Zamenhof).

## EJERCICIOS

Li portas rozkoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon. Mia skribotablo havas kvar tirkestojn. Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj. Ĉu vi havas korktirilon por malŝtopi la botelon? La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon. Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. Sur mia skribotablo sin trovas skribilaro kiu konsistas el inkujo, kelke da plumoj, liniilo, krajono kaj inksorbilo. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por likvoro, glaso por vino, kaj buŝtuko. La jara abonkotizo por ĉi tiu gazeto kostas unu dolaron.

La dumvivaj membroj devas pagi nur unufoje la sumon de dudekkvin dolaroj. La plimulto el la homoj amas la veron. En Nederlando oni troviĝas multaj ventmueliloj. De la sunleviĝo ĝis la dekdua horo (tagmezo), estas la mateno, de tiu horo ĝis la sunsubiro, estas la posttagmezo, de tiam ĝis la noktiĝo, estas la vespero, kaj kiam estas noktiĝinte, estas la nokto. Je la dekdua horo nokte, estas noktomezo. La horloĝo malfruas; ĝustigu kaj streĉu ĝin por ke ĝi ne haltu.

#### TRABAJO PARA REMITIR POR CORREO:

Envíe la composición pedida en la lección anterior.

Construya cinco frases en las que entre al menos una palabra compuesta en cada una.

#### VOCABULARIO

<b>Bapti</b>	Bautizar	<b>Kesto</b>	Cajón
<b>Fajro</b>	Fuego	<b>Lipoj</b>	Labios
<b>Vojo</b>	Vía, camino	<b>Lipharoj</b>	Bigote
<b>Korko</b>	Corcho	<b>Vango</b>	Mejilla
<b>Milito</b>	Guerra	<b>Ŝtopi</b>	Taponar
<b>Kunmetita</b>	Compuesto-a	<b>Kulero</b>	Cuchara
<b>Krei</b>	Crear	<b>Forko</b>	Tenedor
<b>Ligi</b>	Ligar	<b>Glaso</b>	Vaso
<b>Radiko</b>	Raíz	<b>Buŝo</b>	Boca
<b>Postuli</b>	Exigir	<b>Buŝtuko</b>	Servilleta
<b>Kune kun</b>	Junto con	<b>Nederlandp</b>	Países Bajos
<b>Finiĝo</b>	Terminación	<b>Ĝustigi</b>	Ajustar
<b>Porti</b>	Llevar	<b>Halti</b>	Parar
<b>Telero</b>	Plato	<b>Malfrui</b>	Atrasar
<b>Egala</b>	Igual, equivalente		
<b>Puro</b>	Puro-a, limpio-a		
<b>Ŝlosi</b>	Cerrar con llave		
<b>Sorbopapero,</b>	} Papel secante		
<b>Inksorbilo</b>			
<b>Streĉi</b>	Poner en tensión, dar cuerda, reloj, etc.		

## LECCIÓN 25ª

Como complemento y punto final a los estudios de las partes de la oración del Idioma Esperanto que hemos venido desarrollando en nuestras anteriores lecciones, insertamos en ésta el "FUNDAMENTO DE GRAMÁTICA DEL IDIOMA ESPERANTO", tal como fue publicado por el doctor Lázaro Ludovico Zamenhof en su primer librito sobre el idioma, y que ha quedado como fundamento intocable del mismo:

### PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

#### A. Alfabeto

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ,  
Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.

**Rimarko.** Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

#### B. Reguloj

1) ARTIKOLO nedefinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo definitiva (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

**Rimarko.** La uzado de la artikolo estas tia sama, kia en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

2) LA SUBSTANTIVOJ havas la finiĝon "o". Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon "j". Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per aldono de la finiĝo "n". La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per "de", la dativo per "al", la ablativo per "per" aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

3) LA ADJEKTIVO finiĝas per "a". Kazoj kaj nombroj, kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto "pli", la superlativo per "plej"; ĉe la komparativo oni uzas la konjunkcion "ol".

4) LA NUMERALOJ fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de la numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj - la sufikson "obl"; por la nombronajj - "on"; por la kolektaj - "op"; por la disdividaj - la vorton "po". Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj, kaj adverbaj.

5) PRONOMOJ personaj: Mi, vi, li, ŝi, ĝi (pri objekto aŭ besto), si, ni, vi, ili, oni; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivo.

6) LA VERBO ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon -as; la tempo estinta -is; la tempo estonta -os; la modo kondiĉa -us; la modo ordona -u; la modo sendifina -i. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta -ant; aktiva estinta -int; aktiva estonta -ont; pasiva estanta -at; pasiva estinta -it; pasiva estonta -ot. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo "esti" kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas "de".

7) LA ADVERBO finiĝas per "e"; gradoj de komparado kiel ĉe la substantivoj.

8) Ĉiuj PREPOZICIOJ per si mem postulas la nominativon.

9) Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

10) La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

11) Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

12) Ĉe alia nea vorto la vorto "ne" estas forlasata.

13) Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

14) Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion "je", kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicion "je" oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

15) La tiel nomataj vortoj "fremdaj", t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

16) La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo.

## "LA ESPERO"

(Himno Esperantista)

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. Zamenhof

Modelo de carta como para iniciar correspondencia con personas de otros países.

Buenos Ajres la 10an de Novembrø de 1971a.

Al Sinjoro .....

Tre estimata samideano:

Mi havas la plezuron saluti vin kaj sciigi al vi ke mi vidis vian adreson sur la gazeto ....., petanta korespondanton el ĉi tiu lando, kaj kiel mi ankaŭ volus havi korespondanton, speciale en tiu tiel malproksima urbo, mi adresas al vi tiun ĉi ilustritan poŝtkarton kun la espero ke vi akceptos min kiel vian korespondanton. La temoj pri kiuj ĉefe mi dezirus korespondi estas la jenaj: Sociaj problemoj, Filozofio, Religio, moroj de via lando, aŭ pri iu ajn alia interesa temo. Se okaze vi interesiĝas pri la interŝanĝo de poŝtmarkoj, mi havas amikon kiu estas filatelisto sperta kaj mi povus transdoni al li vian adreson kun la rekomendo vin skribi, se tio estas plaĉa al vi.

Tiu ĉi poŝtkarto prezentas vidaĵon de la Registardomo de mia urbo.

Atendante vian baldaŭan respondon, mi restas kun ĉia estimo,

Sincere kaj samideane via,

(Ver principio y final de cartas en el apéndice).

\* \* \*

### V O C A B U L A R I O

Presejoj	Imprentas	Soifanta	Sediento-a
Multenombro	Plural	Tiri	Tirar, atraer
Ceteraj	Los-as demás	Kreski	Crecer
Rigardata	Considerado-a	Afero	Asunto, causa
